REGULARO
PRI LA LINGVA OLIMPIKO POR NOVULOJ (LONo)

Projekto de Irina Gonĉarova

1. Celoj

La *Lingva Olimpiko por novuloj* celas:

- altigi prestiĝon de bona scio de Esperanto inter novuloj;
- altigi lingvan nivelon de novuloj;
- ebligi al la lingvemuloj montri siajn atingojn;
- riveli sukcesajn E-instruistojn;
- aktivigi E-klubojn en la interkluba konkurado;
- motivigi okazigon de lingvaj konkursoj k.t.p. en E-kluboj;
- riĉigi E-aranĝojn per esperantlingvaj programeroj.

2. La organizantoj kaj la Organiza Komitato (OK)

La *Lingva Olimpiko por novuloj (LONo)* estas aranĝo de REU, REJM kaj Rusia ILEI-Sekcio, el kies reprezentantoj estas formata la Organiza Komitato (OK) de LONoj. OK estas formata komence de la lernojaro por la tuta jarperiodo (de septembro ĝis inkluzive aŭgusto.

La Organiza Komitato de LONo:

- respondecas pri okazigo de LONoj;
- stimulas okazigon de LONoj dum regionaj E-aranĝoj (EtaLONoj) kaj en E-kluboj (LOKoj);
- okazigas dumjaraj Lingvaj Konkursoj;
- formas la Ĵurion de la tutlandaj LONoj;
- preparas konkurserojn;
- prizorgas premiojn kaj diplomojn;
- preparas la tutan kadran programon de LONoj;
- prilaboras finajn rezultojn de LONoj, nome, aldonas kromajn poentojn al tiuj de la Ĵurio;
- distribuas nomumojn kaj premiojn;
- zorgas pri konveno de LONoj al tiu ĉi Regularo.

3. **Tempo kaj loko**

LONoj nepre okazu enkadre de la ĉefaj REJM-aranĝoj, nome, dum EoLA (marto), OkSEJToj, OrSEJToj kaj RETo j (somere), eventuale ankaŭ dum REK (se tiu pasas aparte de la menciitaj aranĝoj).

4. **Partoprenantoj**

LONojn rajtas partopreni ajna persono, sendepende de civitaneco, aĝo, maniero de E-lernado, membreco aŭ postenoj en E-kluboj aŭ E-organizaĵoj ktp, kiu:

- komencis lerni Esperanton antaŭ ne pli ol du jaroj;
- laŭ opinio de la Organiza Komitato aŭ aliaj kompitentuloj havas sufiĉan lingvan nivelon por partopreni la konkursojn;
- libervole aliĝis al la LONo-partopreno.

Dum LONoj oni ne faras diferencon depende de la Esperanta eklerno (krom la speciala honorigo de la Ĵurio "La unua inter unujaruloj"). Por unujaruloj partopreno en LONoj estas bonega sperto, kiu ebligas al ili gajni pli da poentoj en sekvantaj LONoj – la avantaĝo, kiun apenaŭ povas havi dujaruloj.

LONo okazas nur kondiĉe ke ĝin partoprenas ne malpli ol 5 personoj.

5. La Ĵurio

La Ĵurio estas formiĝanta surloke el kompetentaj esperantistoj. En la Ĵurio ĉeestu reprezentantoj de la organizaĵoj-organizantoj kaj dezirinde – la Absoluta Gajninto de antaŭaj LONoj. En la Ĵurio nepre ne ĉeestu reprezentantoj de E-kluboj, kies membroj partoprenas la konkursojn (krom la Absolutaj Gajnintoj de antaŭaj LONoj).

6. Taskoj

Antaŭ *Konkursaj taskoj (KT)* okazas *Cerbovigligo*, kies rezultoj ne estas poentigataj. La ***Cerbovigligo (CV)*** celas agordi la konkursantojn kaj demonstri ilian taŭgecon por partopreni la Olimpikon, orientigi la Ĵurion kaj varmigi la publikon. Enhavo de CV plene dependas de OK.

La Konkursaj taskoj (KT), kies rezultoj estas poentigataj kaj sume montras la realan lingvonivelon de la partoprenanto enkadre de la LONo, konsistas el 4 branĉoj:

- voĉlegado
- leksikkontrolo
- tradukado
- retoriko

La enhavo kaj formo de la KT plene dependas de la OK.

7. Honorigoj kaj premioj

Laŭ la rezultoj de LONoj estas aljuĝataj (aŭ ne aljuĝataj) honorigoj kun koncernaj premioj, nome:

- Nomumoj kaj premioj de OK:
  - Absoluta Gajninto
  - La unua inter unujaruloj
  - Esperiga Kuraĝulo
- Laŭdaj nomumoj kaj premioj de la Ĵurio pro:
  - la plej bela voĉlegado
  - la plej riĉa vortprovizo
  - la plej lerta tradukado
  - la plej eleganta kaj konvinkiga parolado
- Nomumoj kaj (eventuale) premioj de la publiko.

Honorigoj de OK ĉiam restas konstantaj. La OK aljuĝas siajn nomumojn kaj premiojn laŭ la rezultoj post sumigo de ĉiuj poentoj de la partopreninto.

Laŭdaj premioj de la Ĵurio povas esti aljuĝataj al ajna partopreninto, povas ripetiĝi (sed ne pli ofte, ol 3-foje) kaj povas esti formulataj aliel. La Ĵurio aljuĝas siajn nomumojn kaj honorigojn strikte laŭ la rezultoj de KT.

Nomumoj kaj premioj de la publiko povas esti aljuĝataj al iu-ajn, kiu koncernas la LONon, inkluzive membrojn de OK kaj ĵurianojn.

Valoro de la premioj. La premioj povas esti ajnaj, laŭ bonvolo de la OK, kondiĉe, ke valoro de la premioj konvenu al la loko en la supra listo: la unua premio estu la plej valora, la laŭdaj – malplej valoraj kaj inter si egalvaloraj. La eventualaj premioj de la publiko povas esti ajnvaloraj, sendepende de realaj atingoj de la partopreninto en LON.

8. Poenta sistemo.

En LONoj ne ekzistas malgajninto. Senescepte ĉiu partoprenanto ricevas 5 poentojn nur pro la fakto de la partopreno en ĉiuj KT.

Sistemon de la poentigo elektas la Ĵurio.

La "kosto" (en la poentoj) de la LON-honorigoj estas jena:

- Absoluta Gajninto — 10
- La unua inter unujaruloj — 8
- Esperiga Kuraĝulo — 5
- Laŭdaj premioj kostas po 3 poentoj, sendepende de la nomumo.
- Nomumoj de la publiko – 1
- Pro la fakto de la partopreno – 5

Ĉiuj tiuj poentoj estas aldonataj al la poentoj de la koncerna persono, gajnitaj pro KT.

Ĉiuj poentoj, gajnitaj de la konkursantoj dum LONoj, estas adaptataj al la sistemo de la Kluba Ranglisto (RoKo) kaj venas al ĝi. Se la partoprenanto ne estas membro de REU/REJM-klubo, la gajnitaj de li/ŝi poentoj ne povas esti konsiderataj en la poentaro de RoKo. Sumo de la poentoj, ricevitaj dum EtaLONoj, antaŭ ol esti adaptataj por RoKo, estas dividataj je 2.

Rezulte de LOKoj al RoKo venas 10 poentoj pro la fakto de la okazigo plus po 1 poento pro ĉiu partopreninto (kondiĉe, ke OK ricevas detalan raporton de la klubo pri la aranĝo kaj pri la kontribuo de la partoprenintoj).

9. La kadra programo

Inkluzivas allogon de amasa publiko, engaĝigon de zelotoj kaj spertuloj, organizon de bonhumorigaj paŭzoj, energia muziko, salon-ornamado ktp. La spertuloj el la publiko devas nepre partopreni la programon kaj elpaŝi post ĉiu KT kun plenumo de la samaj KT – por doni modelojn de majstreco. Dum la plenumo de KT la publiko ne rajtas suflori aŭ eĉ paroli. La kadra programo kaj laboro kun la publiko estas grava tasko de OK.

10. EtaLONoj, LOKoj kaj lingvaj konkursoj.

EtaLONoj estas la “malgrandaj” LONoj, kiuj pasas dum regionaj E-aranĝoj (kiel VER, StRIGo, Strelka ktp) kaj skeme plene egalas al LONo, tamen ĉiuj poentokostoj, venantaj al RoKo, estas dividataj je 2 (*vd № 8*).

Lingvaj Olimpikoj Klubaj (LOKoj) pasas 3-foje jare, dum la samaj, difinitaj de OK, semajnoj en oktobro, februaro kaj majo. En LOKoj povas partopreni ne nur novuloj. Povas ekzisti aparta konkurado por fruaj komencantoj. La kluboj ricevas de OK la samajn KT, du variantojn – por komencantoj kaj por nekomencantoj. Ĉion ceteran la klubo organizas memstare laŭ la adaptita LONo-skemo. Se la rezultoj – minimume de KT – estos prezentitaj al OK, la klubo ricevas konvenajn poentojn por RoKo (*vd № 8*).

Lingvaj konkursoj (LK) estas tra tuta jaro organizataj de OK. LK celas agordi homojn al LONoj, trejni lingvemulojn kaj engaĝi eksterklubajn individuojn. LK estas korespondaj kaj ĉefe individuaj, tamen ankaŭ diversaj grupoj povas partopreni. Taskojn de LK eblas uzi dum lingvaj ekzercadoj en klubaj kunvenoj.